

Ĝenerala Asembleo de Triesta Esperanto-Asocio

Agadraporto de la sekretario por la 2015^a jaro

Dimanĉon la 7^{an} de februaro 2016

- ✪ Fino de la **Projekto Grundtvig**: ELLOKE TUTMONDEN: LA DEFIOJ DE VOLONTULADO, je junio 2015. Lasta seminario okazis en marto en Vercelli. Entute partoprenis kadre de la 3-jara projekto sep triestanoj.
- ✪ **Junie/julie** - Kadre de alia **Projekto Grundtvig**, pri interŝanĝo de Esperanto-instruistoj el Italio kaj Pollando, junio/julie partoprenis 3 personoj.
- ✪ **Aŭguste** – Ĉeesto kaj kontribuo de triestaj esperantistoj en la diverskultura organizita de la “Asocio Poezio kaj Solidareco”: okazis legado de poeziaĵoj en esperanto.
- ✪ **Septembre** – La 26an tri triestanoj kun esperantistoj el Ljubljana propagandis Esperanton dum la aranĝo “Eŭropa Festo de la Lingvoj” en Koper, Slovenio, organizita de la Asocio PINA por Kulturo kaj Edukado.
- ✪ **Oktobre** – Finfine estis eldonita de LUGLIOPRINT “Kiam ekfloras la migdalarbo...”, libro pri poeziaĵoj en triesta dialekto tradukitaj al esperanto. Entute temas pri 26 verkoj de 7 triestaj aŭtoroj. La libro estis prezentita antaŭ kvindeko da lokanoj ĉe la Librejo LUGLIO en centra parto de la urbo.
- ✪ **Novembre** – Konkurso pri Pentraĵoj dulingvaj: partoprenis entute 12 verkoj, alvenintaj el Friulo Juli-Venetio kaj Tuskonio, Slovenio kaj Serbio. Inaŭguro okazis la 28an de novembro, dum la premi-disdonado la 5an de decembro.
- ✪ **Novembre** – De la 27a de novembro 2015 ĝis la 12a de januaro 2016 oni muntis malgrandan ekspozicion en la TEA-sidejo per Kristnaskaj desegnaĵoj faritaj de geknaboj.

.....
✪ **Oktobre**, kunlaborado por la organizo de la 18a Alp-Adria Esperanto-Konferenco okazinta en Opatija, Kroatio, kies ĝenerala sekretario estas Edvige Ackermann.

.....
❖ **Pri ekstera informado:**

- Kiel kutime **anoncoj/informoj** pri kursoj, programoj, aranĝoj en Triesto kaj aliloke estis senditaj dum la jaro al lokaj radioj, ĵurnaloj kaj precipe rete.
- **Alirprogramoj de RADIO UNO**: daŭras la ĉeesto de TEA en la aliprogramoj de RAI. Dum la jaro okazis entute 8 elsendoj pri diversaj temoj.

.....
Ĝeneralaj informoj:

TEA-Bulteno: senhalte la ses-paĝa asocia informilo aperas ĉiun duan monaton. Ĝi estas dissendata al ĉiuj membroj de TEA, ĉu paperversie ĉu rete, kaj ankaŭ al pluraj esperantistoj/grupoj tra la mondo

Elda Doerfler

